

## EN MIA KORO VI TROVOS JESUON!

(Sie werden in meinem Herzen Jesus finden!)

### Efektiva okazaĵo pri infana simpleco de la kredo, kiu povas konduki al konvertiĝo de alia homo.

Ekzistas tia infana preĝeto:

„Jesueto, venu al mi, igu el mi pian infanon. Mia koreto estas malgranda, neniu povas eniri ĝin, krom Vi, mia kara Jesueto.“

Iu knabeto ekkomprenis tiujn ĉi vortojn laŭlitere, ke Jesuo loĝas en lia koro, vere serioze. Jesuo ja eksplicite diris? „Se iu min amas, tiu observos mian vorton kaj mia Patro lin amos, kaj ni venos al li kaj faros loĝon kun li.“ (Joh 14,23) La sekva okazaĵo al ni montras, kion la Sinjoro povas fari por aliujoj, se ni havas en la koro Lin mem kaj lian amon.

Tiu malgranda knabo estis translokigita en malsanulejon per sanitara aŭtomobilo dum huado de sireno. Tuj lin esploris kuracisto. Li alparolis la knabeto dirante: „Mi malfermos vian koreton...“ La knabo interrompis lian parolon dirante: „...kaj vi trovos tie Jesueton.“ Temis pri nekredanta kuracisto. Li rigardis knabon, sulkis la frunton kaj diris: „Mi malfermos vian koron, por vidi, kia difekto kaŭzis ĝian malsanon.“ – „Sed kiam vi malfermos mian koron, tie vi trovos Jesuon. La Biblio diras, ke Li tie vivas.“

#### ... por trovi alian ŝafon

La ĥirurgo ne plu aŭskultis. „Mi diros al vi post operacio, kion mi en via koro trovis.“

„Vi tie trovos Jesuon. Li tie estas.“

Iom iritiĝita la kuracisto forlasis ejon. La knabon li operaciis laŭ sia decidiĝo. Poste li en sia oficejo enskribis notindaĵojn koncerne operacion. Li sidis antaŭ komputilo

ordigante siajn pensojn koncerne al tiu Jesuo de la knabo. „Kial vi tion faris?“ li laŭte demandis. „Vi lin ĉi tien sendis kun tiu malsano, por ke li pro tiu malsano mortu. Kial?“ Tiumomente li en si ekaŭdis la voĉon: „Al tiu ĉi infano ne estis destinite, ke li restadu ĉe vi longajn jarojn, ĉar li apartenas al mia ŝafejo kaj li konstante restados ĉe mi. En mia koro estas neniu suferado, li konsoliĝos tiamaniere, kion vi ne kapablas imagi. Liaj gepatroj iun tagon ankaŭ venos al mi kaj ili trovos kvieton. Mia gregoj konstante kreskos. Mi mian infanon ne sendis sur la teron, por perdi lin, sed por ke li trovu alian erarvagintan ŝafon.“ La kuracisto ekkomprenis, ke la knabon al lia malsanulejo venigis nenia akcidento, sed ke tio okazis pro li. Li rememoriĝis pri sia infaneco kaj juneco. Dum sia sekva kariero li tute ne interesiĝis pri sia animo.

#### Mi trovis Jesuon!

Li revenis en la hospitalan ejon kaj sidiĝis apud la knabeto, dum la gepatroj sidis kontraŭe. La knabo vekigis el narkozo kaj ekmurmuris: „Ĉu vi malfermis mian koron?“

„Jes,“ respondis ĥirurgo kortuŝite.

„Kaj kion vi tie trovis?“ demandis la knabo.

„Mi trovis tie Jesuon,“ respondis la kuracisto kaj ekploris kiel infano, eĉ se li jam estis kvindekjarulo. Tiuj du iĝis tre bonaj amikoj. Pere de tiu ĉi knabo li atingis sian konvertiĝon! ■

Fonto: [www.st-antoni.us.at](http://www.st-antoni.us.at)